



Esperanto

V-19590/
75
(1979)

La Brita Esperantisto

Januaro - Februaro 1979

827

La

Brita Esperantisto

THE BRITISH ESPERANTIST

ELDONAĴO DE BRITA ESPERANTO-ASOCIO

75A Jaro, N-RO 827

Januaro-Februaro 1979

Eldonas:

LA BRITA ESPERANTO-ASOCIO, 140 Holland Park Avenue, LONDON
W11 4UF

Redaktoro:

WILLIAM AULD

20 Harviestoun Road, DOLLAR, Skotlando FK14 7HG

Reklamoj: £20 por tuta paĝo, kaj samtarife (plus 15%) ĝis okona paĝo. Unu senpaga el tri.

Nek la Asocio nek la Redaktoro respondecas pri la personaj opinioj esprimitaj de kontribuintoj al la revuo, kondiĉe ke la esprimoj ne estas kontraŭlegaj.

UK ISSN 0007-067X

INVITO AL EKSTERLANDANOJ

La Brita Kongreso estos je Pasko, la 13an ĝis 16a Aprilo 1979 en la urbdomo de la belega urbo, Cheltenham.

Ni speciale invitas eksterlandanojn partopreni en nia kongreso kaj aranĝas ke entute estos 9/10-taga ferio. Post la kongreso (dum kiu estos kelkaj ekskursoj) okazos 4 ekskursoj tra la bela centra kamparo de Anglujo. Kaj orient-Kimrujaj montoj. Ni intencas uzi la aŭtobuson de Eric Walker de Esperanto FERIA Asocio, kaj ni esperas, ke la kosto estos ne pli ol £10 por la 4 ekskursoj—kompreneble vi pagos pli por manĝado, kastela bileto, ktp. Estos ankaŭ eble aranĝi modestan hotelon, je kosto por 7 noktoj dene pli ol £50, kun lito/matenmanĝo. Ankaŭ por malgranda nombro da alilandanoj ni aranĝos solvi la problemon de mono, kun, ni esperas, kelkaj specialaj gastigaj lokoj.

En la Kongreso ni aranĝos interesan

programon. La ĉeftemo estas 'Internacia Amikeco kaj Esperanto', kun la ĉefprelegisto William Auld. Okazos, ankaŭ, diversaj muzikaj kaj distraj vesperoj, balo, nova opereto (kiun la Bristola grupo prezentos), orgena muziko, diservo, ekskursoj, ktp, ktp. Eric Walker, ankaŭ, aranĝos poste du noktojn en Londono por alilandanoj kaj aliaj kiuj ŝatas partopreni. La eksterlandanoj, tie, aranĝos foriri je dimanĉo, la 22an Aprilo.

Se vi ŝatas partopreni aŭ en la Kongreso aŭ ankaŭ en la postkongresaj ekskursoj bonvolu aliĝi rapide ĉar restas nur mallonga tempo kaj ni bezonas sufcian tempon por aranĝi la aferojn. Kontaktu Walter Hawkins, 307, Stroud Rd, GLOUCESTER GL1 5LF, Anglujo, kun, ni petas, 20%, proks.£12, por rezervi hotelon, ekskursojn, ktp.

HO. . . ., TIU DATREVENO!

Kara leganto! Ĉu vi ankoraŭ memoras kiamaniere via klubo festis la Zamenhofan Tagon 1978? Preskaŭ certe ke vi jam forgesis! Por certigi ke mi ne forgesos tion kion mi aŭdis en mia Klubo, mi skribas ĉi tiujn liniojn je la 15-a de decembro, la tago post kiam ni celebris en ĝi tiun tradician feston.

Je ĉi tiu jaro (1978) la vespero estis speciala. La samideanoj gaje ridetis, la vizaĝoj respogulis animan eŭforion. La kaŭzo de ĉi tiu ne kutima gajeco estis la artikoloj, radio-komentoj kaj televiziaj intervjuoj pri Esperanto kiujn oni legis, aŭdis kaj vidis dum la ok aŭ sep tagoj antaŭ la vespero. Ni ricevis glason de ŝereo, laŭ la kluba tradicio dum ĉi tiu festo, per kiu ni festas ankaŭ Kristnaskon. Ni sidigis, multaj el ni ankoraŭ portante la glason, kaj atendis la komencon de la programo. La Prezidanto parolis pri ĉi tiu neatendita kaj libere disdonita informado rilate al nia movado. La kaŭzo de la lavanga publiko, laŭ li, estis raporto sendita de BEA al la informilaro kiu menciis la centjaran datrevenon (mi ekpensis, kiu centjara . . .?). Entuziasme li parolis pri la historia, grandege senprecedenta "trarompajo" (li uzis nacilingvan vorton) antaŭ la skeptika kaj indifera publiko. "Ni rompis la barilon de silento malantaŭ kiu, intence kaj perverse, ĵurnalistoj kaj aliaj volis kaŝi nin." Li komparis la rezulton de tiu raporto de BEA kun la rezolucio de Montevideo fare de UNESKO en 1952 kaj la salutvortoj de Prezidento Jonas en perfekta Esperanto kiam li malfermis la Universalan Kongreson de 1970 en Vieno. Post fervora aplaŭdo de la 23 ĉeestantoj venis la dua ero.

Nia spertulino legis elĉerpaĵon el la letero en kiu Zamenhof skribis al Borovko pri la festeno de la 17-a de decembro 1878. Tiam Zamenhof kaj amikaj gimnazianoj parolis kelkajn frazojn en la *Lingve Uniwersala* kaj kunkantis la refrenon:

"Malamikete de las nacjes . . ." k.t.p.

kaj mi ekkriis mense kaj silente: "Jen la centjara datreveno pri kiu BEA aludis en la raporto!" Mi rigardis la malplenan glason, esperante ke ankoraŭ restos iom da ŝereo en la botelo por ricevi duan dozon je la fino de la programo kaj komencis cerbumi pri la etiko de tiu raporto. Ĉu ĝi klare klarigis, ke de tiu lingvo parolita antaŭ cent jaroj restas nur la 16 vortoj de tiu refreno, menciitaj en la letero de Zamenhof? Kaj ĉu ĝi klare klarigis, ke tiu lingvo ne estis Esperanto?

La programo finiĝis. Ankaŭ la ŝereo finiĝis kaj ni ne ricevis duan glason. Do, ni sep trinkemuloj iris al la "Ora Ŝafpelto" por malsekigi la gorgon. Tie, inter bruo, odoro de biero kaj fumo ni komentis pri tiu stranga fenomeno: la intereso de la informilaro pri nia lingvo kaŭzita de, eble, ne klare precizigita raporto fare de la Publica Komitato de BEA. Neniu el ni vidis aŭ legis tiun raporton. Ni pridemandis la etikon de tiuj samideanoj kiuj estis intervjuitaj, ĉar ŝajnis ke neniu el ili klarigis ke la centjara datreveno estis nur *naŭdek-unu-jara!* "Jen la vivo," ekdiris Robĉjo, "peco da papero kun iomete sensacia novaĵo efikis pli ol miloj da leteroj kaj reklamoj." Li malplenis la glason kaj signalis per ĝi al Nanjo, la volupta servistino, indikante pluan mendon. Ricevis ĝin, rigardante lascive ŝian provokeman dekolton, gustumis la bieron per bruema sorbo kaj diris: "Donu al mi unu aŭ du kiel Nanjo en ĉiu klubo kaj tiam la afero kreskos. Imagu, se ni povus havi *verdulinon* sur paĝo 3 de BE . . .!

Revenante ĉe mi, mi memoris pri la multaj momentoj kiujn Esperantistoj laŭdis kiel triumfajn trarompajojn: la venko de D-ro Lapenna en Montevideo, prezidentoj kaj ĉefministroj kiuj flue bonvenigas kongresojn en nia lingvo, Radio Stoke elsendanta lecionojn en Esperanto, kaj multaj aliaj. Kaj ni ankoraŭ batalas kontraŭ misprezentoj kaj

falsaĵoj. Laŭ la elĉerpaĵoj kiujn mi legis en la Klubo kelkaj el la ĵurnalaj artikoloj naskitaj de la raporto de BEA ne estis favoraj. Iuj estis vere mokemaj kaj malinstigos al homoj eĉ alproksimi nin. Sed se la raporto estis iom fripone verkita, ĉu ni rajtas plendi pri alies friponaĵoj?

Mi ankoraŭ dubas pri nia kapablo bone informi, pardonu min, publici. Eble vi legos ĉi tiun rubrikon je la 1-a de aprilo . . ., do mi ne plu komentas!

Alariko.

Geoffrey Chaucer

LA RAKONTOJ DE CANTERBURY

La Paroĥestro

Ĉeestis bona homo religia,
Malriĉa, urba Paroĥestro pia,
Sed li en sankta servo vivis riĉe;
Klerulo, kun deziro sindediĉe
Prediki vere la evangelion
Kaj al paroĥo porti instrukcion.
Bonkora estis li kaj diligenta,
En malfeliĉo ĉiam pacienca,
Kaj tion pruvis lia abomeno
Elpremi dekonaĵojn per malbeno.
Prefere, al malriĉaj paroĥanoj,
Doninta estus li per propraj manoj
El siaj monkolekto kaj rimedoj.
Satigis lin malmulto da posedoj.
En la paroĥo vivis multaj homoj,
La voj' penige longa inter domoj;
Sed eĉ se ŝtorme tondris la vetero,
Se vokis lin malsano aŭ mizero,
Malproksimulon, noblan aŭ humilan,
Vizitis li, farante la vojiron
Sur la piedoj, stangon en la mano.
Ekzemplis li por ĉiu paroĥano,
Ke antaŭ ol instrui oni faras.
En la Biblio tiuj vortoj staras.
Figur' aldona por la konsidero—
Se oro rustas, kiel status fero?
Se pekas pastro kiun oni fidas,
Ne strange, ke la malklerul' putriĝas.
Hontigu pastron jena epitafo:
"Pli kota la paŝtisto ol la ŝafo".
La pastro per ekzemplo devas gvidi

Por montri al ŝafaro kiel vivi.
Li ne prebendon sian forluigis
Kaj, dum la ŝafoj en la koton migris,
Li mem, ĉe Sankta Paŭlo en Londono,
Instalas sin kapela sacerdoto,
Aŭ eble gilda pastro rezidenta;
Sed hejme, al la ŝafoj tre atenta,
Li gardis ilin kontraŭ lupvizito.
Laboris li por amo, ne profito.
Li estis pia tamen grandanima,
Neniam al pekulo malestima;
Parole ne fiero aŭ rigora,
Sed instruisto milda kaj bonkora.
Ĉielen tiri homojn per sincero
Kaj bonekzemplo, jen la ĉefafero;
Sed al persono kun rigida nuko,
Egale al kampul' aŭ nobla duko,
Li donis la korekton sen prokrasto.
Li nepre estis la plej bona pastro.
Por si li ne deziris riverencon
Aŭ flegis la pedantan konsciencon.
Laŭ Krist' kaj l'apostoloj li instrue
Doktrinis, sed laŭfaris mem unue.

Trad. W. B. Johnson

Kapela sacerdoto: Pastro kun salajrita deĵoro ĉiutage kanti la meson en kapelo por la ripozo de animoj, precipe por tiu de ĝia fondinto.

NIA KOVRILO

Ni montras nur kelkajn el la esperantistoj de Suffolk, kiuj festis la datrevenon de Zamenhof en la restoracio Regal, Felixstowe. Post la manĝo okazis kabaredo.

UNIVERSITATO DE LONDONO

"Goldsmiths' College" inkluzivas Esperanton por semajnfina studrondaro —aprilo 6-8, 1979, ĉe Bishop Otter College, Chichester (apud Portsmouth), West Sussex. Por komencintoj kaj mezgraduloj de ie ajn. Kosto £19 inkluzive. Detaloj kaj aliĝiloj: John Brownlee, 20 Sunnyside Gardens, Upminster, Essex, RM14 3DS. Tel. Upm. 24645.

PRELEGOJ PRI BAGHY

D-ro Marjorie Boulton prelegos pri la verkaro de Julio Baghy ĉe Kultura Semajnfino de Sarlanda Esperanto-Ligo en Blieskastel-Niederwüzbach, la 4an ĝis la 6a de majo 1979.

“MI NE ESTAS SENTIMENTE LIGITA AL ESPERANTO”

Reinhard Haupenthal interparolis
kun William Auld

(Fino)

La anakronismo Lapenna

RH: Vi menciis nomon disputatan. Ĉu la kazon de Lapenna vi vidus ankaŭ en la lumo de nia antaŭa demando de la Esperanta kulturo?

WA: Tio estas parto de nia kulturo evidente. Oni ne povas esti tia elstara figuro en la Esperanto-movado dum 20 jaroj kaj ne kontribui al la kulturo. Estas, se mi rajtas diri, estas same kiel Hitler en Germanujo: oni ne povas diri, ke li nenion kontribuis: en kazo de Hitler malbonon, en kazo de Lapenna bonon. Sed li ekzistis kaj per tiu ekzisto kaj influo li evidente influis la ĝeneralan kulturon. Kaj tio estas neevitebla kaj ankaŭ ĝi estas bona afero.

RH: Pozivi- au negative el via momenta juĝo?

WA: Ambaŭ, ambaŭ. Ĉi tie ni parolas malkaŝe: Lapenna multon kontribuis al la Movado. Laŭ mia opinio lia malfacilaĵo estas, ke li neniam evoluis. Liaj ideoj, laŭ mia opinio, ne evoluis dum 20 jaroj. Kaj kio estis necesa antaŭ 20 jaroj, fariĝis nenecesa 20 jarojn poste. Kaj tio estas tute normala homa okazaĵo.

RH: Ĉu oni povus diri, ke Lapenna fariĝis anakronismo?

WA: Jes.

Poeta metiejo

RH: Por reveni al via verk-maniero: ĉu vi povas priskribi ĝin: ĉu vi bezonas difinitan tempon, ĉu vi bezonas difinitan

medion por verki?

WA: Difinita tempo absolute helpas kaj dum preskaŭ 10 jaroj mi havas la kutimon ĉiutage je la sama tempo pasigi unu horon super diversaj kreaĵoj aŭ tiaj similaj laboroj. Mi povas verki kie ajn. Medio ne gravas al mi. Kaj ankaŭ diversmaniere: kiel mi diris, mi laboras rapidege kaj ofte mi tajpas rekte sur la paperon miajn poemojn. Kaj se ĝi ne estas poemo, mi ĉiam rekte . . . mi malofte revizias— ĉu bone aŭ malbone. Mi malofte revizias, tutajn poemojn mi simple tajpas rekte kaj apenaŭ ŝanĝas.

RH: Ĉu vi ŝatus, se via verkista agado estus via panakira laboro?

WA: Jes.

RH: En tiu kazo via “profana” profesio ankaŭ estas speco de malhelpo.

WA: Jes.

RH: Ne donanta inspiron?

WA: Aĥ, mi ŝatas mian laboron . . .

RH: . . . inspiron por la verkado.

WA: Al la verkado ĝi malhelpas. Mi ne trovas miajn temojn en la lernejo, ne. Fakte, mi ege ŝatas junulojn, kaj mi estas akceptata de la junuloj ĝenerale. Ili ne forrifuzas min, ni ĝenerale ŝatas nin reciproke, sed ĝi estas speco de supra kontakto tamen. Mia persona vivo ne multe inkluzivas la junularon. Kaj certe ne la lernejon. Ĝi estas speco de laboro kiun mi faras pli malpli kompetente, pli malpli ĝi ne ĝenas min, mi ne sentas ĝenon ke mi iras al mia laboro, sed tamen mi preferus esti nur verkisto.

Oni ne fosu en mia vivo

RH: Ĝis kia grado oni trovas la aŭtobiografion de William Auld en liaj poemoj?

WA: Malmulte. La escepto estas *Humoroj*. Tio estis speco de taglibro dum unu jaro. Komprenoble lau miaj propraj poeziaj kriterioj mi klopodis objektivigi personajn spertojn, certe. Sed ili baziĝas absolute sur la spertoj de unu jaro. Kaj mi verkis ĉiam en la mezo de la sperto, ne poste, kiel oni ofte faras.

RH: Ĉu do vi ne dirus pri viaj verkoj kiel Goethe, ke ili estas vivkonfeso?

WA: Ne.

RH: Aŭ la fina punkto de iu vivo-fazo? Kiel ĉe la Suferoj de Juna Werther. Kiel ĉe multaj postaj verkoj de Goethe.

WA: Ne, ne. Mi havas tute alian intencan. Ekz. mi opinias, ke Marjorie Boulton eksterigas siajn internajn spertojn kaj sentojn. Mi ne, mi ĉiam volas kaŝi tion kio estas al mi emocie grava.

RH: La kono de via biografio do ne estas kondiĉo por la kompreno de la verkoj?

WA: Laŭ mi ne. Mi ne tre deziras, ke biografioj tro fosu en mia vivo. Sed povus okazi, kaj mi ne povas malhelpi, sed tamen tio ne plaĉas al mi.

RH: Ĉu do personaj biografiaj spertoj estas malpli gravaj kiel instigaj faktoroj ol tio kion oni povus nomi la mond-koncepto kiun vi volas mesaĝi?

WA: Mia inspiro estas ĝenerale pli intelekta ol emocia.

La postrestanta prozo

RH: Pri la bezonoj de nia literaturo: kie vi vidus hodiaŭ la ĉefajn mankojn?

WA: Ho, en la originala prozo, sendube, laŭ mi. Ĝi ege postrestas nian poezion...

RH: . . . kvante aŭ kvalite?

WA: Ambaŭ. Kvalite . . . pu! Ekzistas niaj bonaj verkoj, certe. Sed ankaŭ kvante, diablo! El la kvanto venas la kvalito. Unu el la gravaj atingoj de Stafeto estis, ke la poemarojn eldonis Régulo ne nur la plej gravajn kaj elstarajn, sed tute minorajn poemarojn, kaj tiu tuta gamo necesas laŭ mi por havi

kvaliton. Oni devas, por havi majstro-verkon, oni devas ankaŭ havi siajn ordinarajn akceptindajn etajn verkojn kiuj donas plezuron al multaj kaj kontribuas per kelkaj liriko al nia kulturo.

Kio estas grava afero, kaj kio ne okazas ĉe la prozo, ĉiu proz-verko kiu aperas, estas kvazaŭ fortostreĉo de unu persono kiu tamen dediĉis tempon al tiu art-formo, sed ne sidas komforte en iu tradicio kontraŭ kiu li eventuale povus reagi. Tiu mankon ni absolute devas forigi. La homoj devas ankoraŭ krei prozon, ĉar nia poezio estas sana.

Kultur-ministraj celadoj

RH: Ĉu lige kun via nova ofico de kvazaŭ kulturo-ministro de la Esperanto-Movado vi vidas eblecon ke la Movado kiel tuto kreu favoran klimaton kaj por la verkado (traduka aŭ originala) kaj—mi opiniis tion antaŭe—por la esploro de tio kion ni atingis?

WA: Tion mi celos. Tion mi rigardas kiel unu el miaj taskoj, ĉar mi estas estrarano pri kulturaj aferoj, kaj se tiu frazo havas iun ajn signifon, ĝi inkluzivas evidente nian literaturon.

Jes, kion la Movado bezonas nuntempe, estas aŭtoritata literatura gazeto, tute internacia, do tutmonda en sia influo kaj altir-forto kiu vartos la prozon, ĉefe en la nuna epoko la prozon, tiel kiel siatempe *Literatura Mondo* vartis la tradukadon ekzemple kaj la poezion—ankaŭ la prozon ĝis certa grado. Tia centra aŭtoritata literatur-organo estas absolute necesega, ĉar alie la kontribuoj estos tro sporadaj, tro dissemnitaj, ne havos centran tension. Pripensu ke preskaŭ ĉiuj bonaj aŭtoroj de la tridekaj jaroj estis kontribuantoj al LM. Ne ĉiuj, sed preskaŭ. La influo de tiu revuo estis netaksebla el tiu vidpunkto.

RH: Ĉu vi kredas, ke la fenomeno LM estos ripetebla?

Necesas nova Literatura Mondo

WA: Komprenoble ne en tiu formo, sed jes absolute mi kredas tion, kondiĉe ke oni aliru la aferon laŭ samaj kriterioj. LM estas fenomeno de la tridekaj jaroj. Nia

nova revuo devos esti fenomeno de la okdekaj jaroj. Sed tamen oni devas aliri la aferon el vidpunkto de la kreado de vivanta kaj floranta Esperanta kulturo. Kaj Esperanta signifas tutmonda, ke ĉiu kiu verkas, estu bonvena inter la kovroj de tiu revuo.

RH: Ĉu do por ripeti tiun fenomenon en nia tempo ne necesas sama centra figuro kia estis Kalocsay?

WA: Necesas nur bona redaktoro, laŭ mi. Centraj figuroj, jes, estas ofte utilaj. Kalocsay estis. Sed necesa—ne.

Kiam la kvanto ekzistos, la kvalito suprenjetos kelkajn figurojn, ĉu ne? Kaj tio estas normala. Kaj tiuj figuroj havos siajn influojn, evidente. Sed ne, la kulto de la personeco ne plu estas aktuala.

RH: Ĉu ni kultis Kalocsay?

WA: Jes. Tion li mem ne kuraĝigis, sed tamen oni kultis lin.

RH: Prave aŭ malprave?

WA: Prave.

RH: Ĉu tiam estas kulto?

RH: Aŭ, laŭ mi jes. Sed tio dependas de la difino, ĉu ne?

RH: Ĉu vi opinias, ke Kalocsay havas, laŭ sia signifo, laŭ la amplekso de lia agado, laŭ la modela karaktero de lia agado, daŭriganton, posteulon, ripetanton?

Auld—posteulo de Kalocsay?

WA: Tiun postenon mi mem ambiciis antaŭ 25 jaroj.

RH: Generale aŭ sur unu kampo?

WA: Sur unu kampo, sur la kampo de la poezio. Sed, kiel mi diris, mi opinias, ke tiu posteno estas jam malaktuala.

RH: Do la fenomenon Kalocsay vi opinias neripetebla?

WA: Ripetebla, sed ne necesa, ne ripetenda. Jes, ĝi povus okazi, kompreneble, kiu volas profeti, kio okazos en nia kulturo? Sed Kalocsay necesis siatempe. Ĉu hodiaŭ necesas iu simila, mi dubas. Ankaŭ en nacilingvaj kadroj oni ofte havis tiajn ŝlosilajn figurojn, sed ĝenerale en la plej primitivaj fruaj epokoj de la koncerna lingvo—kaj same ĉe Esperanto. Esperanto absolute bezonegis Kalocsayn, sen Kalocsay ni ne havus

hodiaŭ la kulturon kiun ni havas. Sed tiu epoko forpasis.

RH: La literaturan merkaton—kiel vi dezirus ĝin plibonigita, ŝanĝita?

Nova vento por la literatura merkato

WA: Mi ŝatus, ke la esperantistoj havu pli da okazo vidi la eldonajojn. Mi konstatis, ke se oni devas mendi per poŝto, oni simple ne faras. Sed se oni prezentas eblecon al la esperantistoj vidi kaj palpi kaj foliumi, ili multe pli volonte aĉetas. Kaj ne la aĉetado gravas, kvankam ĝi estas ekonomie grava, sed la fakto, ke oni aliras al la lingvo, estas la grava afero. En la nuna momento ni tro dependas...

/Ĉi tie la bendo finiĝis, kaj daŭris iom por ke la fadeno revenu al la bobeno./

RH: . . . ni restis ĉe la literatura merkato...

WA: Ja, ja. La ebleco vidi kaj palpi, kiel mi diris, la librojn, estas la plej grava afero. Kaj tio mankas al ni, efektive. Ni tro dependas, mi diris, de recenzoj, personaj rekomendoj eventuale, de la subskribo de ĉekoj por forsendi, de tuta administra afero, kio estas nenatura, certagrade. Kiam temas pri nacilingvaj verkoj, ni iras al butikoj kaj aĉetas. Do, mi ŝatus, ke iamaniere en ekz. la grupoj aŭ en la societoj iu respondecu pri la prezentado de la libroj al la anoj—tio okazas en multaj rondoj, ekz. en via rondo, ke vi respondecas, vi montras la librojn kaj la homoj aĉetas. Sed tio ne okazas en ĉiu grupo. Ofte oni parolas pri tio, ke oni nur aĉetas unu ekzempleron por la grupo, ankaŭ bone.

Ĉ. 1950 Rossetti kaj mi organizis skotan kongreson kaj ordinare en tiu tempo oni vendis librojn en tia kongreso por kvin pundoj. Kaj ni—li fakte—riskis: li skribis al Budapeŝto kaj li akiris malnovajn eldonajojn de Literatura Mondo kaj dum tiu kongreso ni kreis certan snobismon: ni citadis el la verkoj, ni menciadis la nomojn, ni rekomendadis ktp. kaj en la fino ni vendis por naŭoble pli ol la meza, do por 45 pundoj. Kaj tio pravis al ni, ke se oni ebligas al la esperantistoj eĉ elekti, oni havas amason

da libroj kiujn elekti, do ni devas scii . . .

RH: Oni ĵus memoris la 90-jariĝon de Esperanto. Kun kiaj sentoj vi alfrontas la lastan jardekon de nia unua jarcento?

“Pri la fina venko mi ne kredas”

WA: Mi antaŭĝojas . . . ha, ha, ha.

RH: Kiel vi konkrete vidas el la nuna perspektivo kaj el nia nuna situacio nian futuron?

WA: Pri la futuro mi estas certa, se temas nur pri la ekzisto de la lingvo. Kaj fakte iomete pri la fina venko mi ne tre kredas en la nuna konjunkturo. Nome, mi ne opinias, ke iun belan tagon la tuta mondo parolos Esperanton aŭ ĉe scios pri ĝi.

RH: Ĉu vi ne opinias tion katastrofa?

WA: Ne. Mi ne estas unu el tiuj. Mi ne perdis mian intimecon. Mi simple milionobligus mian eventualan publikon kaj miajn verkojn.

Ne, ne, ne. Mi ne estas tiel sentimentre ligita al Esperanto. Ni parolis pli frue pri ideologio kaj tio ŝajnas iomete sentimenta, efektive, vi mem supozigis tion. Sed fakte, mi ne estas sentimenta tiurilate, mi estas praktika. Por mi Esperanto estas vere praktika necesajo en la mondo. Mi opinias, ke la homoj ankoraŭ hodiaŭ tro subtaksas la gravecon de la lingva problemo el ĉiuj vidpunktoj, ne nur el simple ekonomia—kio estas grava—sed ankaŭ el psifologia vidpunkto. Kaj Esperanto estas praktika necesajo kaj mia devo—se vi volas—estas certigi la daŭrigo de la ekzisto de Esperanto.

RH: De kio ĝi pleje dependas laŭ vi?

WA: Informado, de informado. Ke ĝi iom post iom akceptiĝu kiel natura fenomeno, nome ke ne necesas ke la homoj lernu Esperanton, sed ke oni akceptu la fakton de ĝia reala ekzisto. Kio ĝenas min ĉiam pri la kritikoj kontraŭ Esperanto, estas ke ili ignoras faktojn, ke ili baziĝas sur subkonsciaj ideologiaj konceptoj kiuj ne pruviĝas per la realo. Oni diras ekz., ke la japanoj neniam parolos Esperanton, ĉu ne, ĉar ili ne kapablas diri *l*. Sed fakte, la sama

afero estas, kiam ili lernas anglan lingvon. Ili same ne povas prononci *l* krom se ili sin dediĉas al tio. Sed la fakto estas, ke en Japanujo estas sufiĉe multaj homoj kiuj uzadas Esperanton ĉiutage kaj do tio ne estas fakto, ke la japanoj ne akceptas. Estas fakto, ke oni serĉas pretekstojn por senvalorigi Esperanton kaj iom post iom ni sukcesas krei respekton al Esperanto. Parte ĉar oni forigis la troajn verdajn stelojn. Verdaj steloj ne estas ideologio, verdaj steloj estas ekstera manifestajo.

Esperanto postvivos

RH: Ĉu vi opinias situacion ebla en kiu Esperanto malaperos?

WA: Jes. Sed mi ne atendas tion. Ĝi povus malaperi pro diversaj kausoj, ekz. se oni detruus la civilizacion per atom-milito. Tiam ne plu estus necesa Esperanto.

RH: Mi ne irus ĝis tia ekstremo.

WA: Ne. Nur en unu sola kazo, ke iu alia lingvo estus tutmonde akceptita kiel la natura mondlingvo, sed tion mi ne antaŭvidas pro la politika implikiteco de la naciaj lingvoj. Neniu nacio, neniu potenco permesos ke unu lingvo akceptiĝu.

RH: Ĉu vi akceptas la tezon de Zamenhof, ke la denaska lernado de Esperanto estas decida por ĝia daŭro?

WA: Fakte ne, fakte ne. Estas, ĉu ne, unu el la fenomenoj de nia movado estas, ke multaj denaskaj esperantistoj neniam uzas la lingvon kiam ili plenkreskiĝas. Ili simple ĝin ne plu uzas. Mi povas citi ekzemplon el Usono de plenkreskintaj denaskaj esperantistoj kiuj simple neniam plu uzas la lingvon. Kaj ne tio estas ĉar ili ne ŝatas, sed ili ne havas okazon.—Decida—absolute ne. Ke ĝi estas dezirinda, jes.

RH: Ĉu ĝi ne estas la lasta konsekvenco por tiuj kiuj akceptas Esperantan kulturon pri kiu ni komence parolis?

WA: Ne, tio baziĝas evidente sur la teorio, ke se oni naskiĝas en kulturo, oni posedas tiun kulturon. Sed kara mia, la kulturoj estas artefaritaj. La kulturojn oni akiras, la kulturojn oni devas lerni. Oni ne

havas kulturon ĝis oni estas edukita.

RH: Jam en la gepatra hejmo tamen.

WA: Bone, tio estas bona komenco. Sed kion mi lernis en la gepatra hejmo pri Hamleto kaj Dante kaj mi-ne-scias, ĉu ne? Por mi tiu vorto kulturo implicas ion pli ol infan-rimajojn—kio estas parto de la kulturo, mi akceptas, sed nur eta, malgranda parto.

RH: Sed aliflanke la ĉefa rimedo de la kulturo estas la lingvo. Kaj ĉu vi ne opinias, ke la konvinkita esperantisto sekve aplikas la rimedon lingvo en ĉiuj siaj manifestiĝoj?

WA: Jes, mi estas por tio, ke oni eduku sian infanon ekde la lulilo pere de Esperanto apud iu alia lingvo. Jes, mi estas centprocente por tio. Kaj mi ne dubas ekz., ke tio povus esti granda kontribuo al la kompreno pri Esperanto. Mi nur diris, ke mi ne konsentas kun Zamenhof, ke ĝi estas la necesa faktoro. Mi simple ne kredas, ke iu ajn denaska esperantisto en la mondo posedas Esperanton pli bone ol mi. Mi tamen ne estas denaska.

Oni povas—tio estas unu el la avantaĝoj de Esperanto, ke oni povas havigi duan lingvon kaj duan kulturon je kiu ajn aĝo, se oni dediĉas sin al tio.

RH: Do ne sufiĉas la apliko de la lingvo, sed la neceso pri adekvataj institucioj kompareblaj al lernejoj, universitatoj en la naciaj lingvoj. Do, kion hodiaŭ la Esperanto-movado devus fari por krei tiujn ekvivalentojn?

WA: Aĥ, bela demando por estrarano pri kulturaj aferoj. Ni devas fronti al tio, jes. Pri la ekzameno kaj tiaj aferoj. La plej utilaj tiaj institucioj en la nuna tempo estas aferoj similaj al miaj kursoj en San Francisco, nome miaj superaj kursoj kie en tri semajnoj—en kvar semajnoj foje—oni pli-malpli kunvivas en esperantista medio kaj studas la Esperantan kulturon je universitata nivelo. Kaj tio estas aranĝebla diversmaniere. Ekz. vi iros al Barlastono, kiel al mi okazis de tempo al tempo. Ekzistas aliaj stud-ebloj, ankaŭ mi supozas en Lieĝo. Ekzistas tiaj institucioj kie oni kunvenu kiel seriozaj esperantistoj kaj studu tutsimple. Kaj tio estas fakte

aranĝebla. La problemoj estas kiel kutime geografiaj, ĉar multaj homoj kiuj volus ekz. ĉe mi studi en San Francisco, tamen hazarde loĝas en Belgujo. Tio estas granda ekonomia fortostreĉo kaj por la plimulto ne eblas. Ankaŭ oni devus provizi gvidliniojn por la studado de la kulturo. Ankaŭ tekstojn. Mi scias, ke vi kaj aliaj faras grandan servon reeldonante ŝlosilajn verkojn el la pasinteco por ke la homoj havu la eblecon studi ilin. Sed ankaŭ la studado devus laŭ mi esti gvidata iamaniere, same kiel en universitato iu profesoro gvidas vian studadon. Li atentigas vin pri la direkto de via studo ktp. Kaj tio necesas ĉe ni. Kiel aranĝi ĝin estas alia afero.

La problemo de kultura dulingveco

RH: Vi uzis antaŭe esprimon eble iom eksmodan kiam vi parolis pri “fina venko”. Eble vi parolu pri la aspiroj de la Esperanto-movado. Ĉu vi ne opinias, ke, se nia akceptita celo estas kultura dulingveco per Esperanto—almenaŭ mi konceptas nian celon tiel—tio estas por la granda plimulto de la homoj ne realigebla, ĉar troa ŝarĝo?

WA: Jes. Sed ni devas ankaŭ fronti al la fakto, ke la granda plimulto de la homoj ne estas kulturaj homoj en tiu specifa senco, ĉar la proporcio de universitate edukitaj homoj en kiu ajn nacio estas vere treege malgranda. Kaj oni poste parolas pri “elitismo” ktp.—sed tiu elitismo ne estas parto de la afero, ĝi estas ekstere trudita. La signifo de la kulturo estas, ke nur kelkaj homoj povas fariĝi vere kulturitaj homoj laŭ tiu preciza senco. Kaj same en Esperanto. Jes, ĝi estas granda ŝarĝo por la plimulto. Tamen, malgraŭ tio nia Movado estas fakte plenplena de kulturitaj homoj, do de homoj kiuj faris al si la penon kaj prenis la ŝarĝon kaj lernis sian kulturon laŭ siaj fizikaj eblecoj. Kaj tio estas la grava fakto. Se morgaŭ Esperanto estos akceptita kiel la dua lingvo por ĉiuj en la tuta mondo, la nombro de kulturitaj esperantistoj laŭ proporcio ne multe kreskos. Pli multaj homoj turismos per ĝi, ili korespondos per ĝi kaj tio estas bona

afero. Ne ĉiu homo havas tiun talenton, tiun aspiron. Multaj homoj estas tre praktikaj, ĝardenistoj, terkulturistoj, havas siajn specifajn talentojn kiujn mi ne havas kaj per tio ili kontribuas al la homa socio kaj tiel daŭros, ankaŭ poste. Sed por tiuj, kiuj celas kulturon Esperanto tamen...

Wüster malpravas—Waringhien pravas

RH: Ni de kelka-tempo jam troviĝas en la kampo de la spekulacioj ankaŭ. Eble do lasta demando pri tiu futuro de nia afero, kiu estas tamen pli grava ol nia paseo: Estas du antagonismaj sintenoj: Wüster iam skribis, ke la kazo de Esperanto povas esti rigardata kiel finita afero, ĉar ĉiuj eĉ plej seriozaj klopodoj ĝin enkonduki en la lernejojn fiaskis. Kio estas fakto. Aliflanke lastatempe Waringhien skribis okaze de la 90-jariĝo de la lingvo, ke la ĉefa tasko de la nuna Esperanto-movado estas elteni. Ĉu vi opinias, ke li pravas pri tiu tezo de la eltenado?

WA: Waringhien pravas kaj Wüster malpravas. Nu, li pravas en sia konstato, sed ne en sia konkludo el la konstato. Waringhien pravas, ĉar bedaŭrinde nia homa vivo ĝenerale estas limigita al la longo de unu homa vivo. Kaj do ĉiu individuo deziras, ke ĉio plenumiĝu kiel eble plej rapide, ĉar ni havas nur 80 jarojn por vivi kaj do ni juĝas laŭ tiu kriterio. Sed historiisto kiu rigardas la historion konstatas, ke ideoj bezonas jarcentojn ofte por vere efektiviĝi. Ni notu nur la kristanisman aŭ la decimalan sistemon aŭ . . . ĉu ne? Multaj tiaj reformoj bezonis multe pli ol unu aŭ du aŭ eĉ pli homajn vivojn por vere efektiviĝi. Kaj mi kalkulas Esperanton inter tiun nombron. Kaj do pro tio Waringhien pravas kaj nia devo estas elteni ĝis la konjunkturo historia trudos al la homaro tiun solvon. Tio estas racia solvo kaj la homoj ĝenerale ne estas raciaj.

RH: Vi do pli—por resumi—akceptas vian siatempan resumon de la homara historio: — Sargono — Aleksandro — Zamenhof?

WA: Jes, tute precize tion.

RH: Mi dankas por nia interparolo.

Du Naivuloj en Ok Landoj (2)

POLVOŜTORMO KAJ LABIRINTO

Ni vekigis refreŝigitaj en nia Salzburga hoteleto. Post matenmanĝo kaj vizito al nutraĵ-butiko ni forvojaĝis frue.

Subite nia ŝoseo iĝis impona, nova aŭtovojo pagiga. Ni fulme rapidis tra novaj tuneloj, kaj bonhore troviĝis je la alia flanko de la Alpoj, kie la aŭtovojo abrupte ĉesiĝis. Supre, flugantaj de montoflanko al montoflanko, belaj arkajoj indikis, kie aŭtovojo estOS. Sed ni jam pagIS! Toĉ, iom pie, diris, ke plaĉas al li kontribui al la glora estonteco de Aŭstrio.

Sen pluaj aventuroj—al la landlimo; la kutima, facila kaj ĉarma vojaĝo en Jugoslavion; kaj (bonŝance, pro manko de trafiko) rapide al Slavonsky Brod, sude de Zagreb. Vesperigis. La hotela kelnero insistis paroli germane kun ni, sed poste, pro neceso, parolis angle al italaj klientoj. Freneza,abela mondo!

Ni salutis riveron Sava, kiu memorigis nin pri la Universala Kongreso en Beogrado, kie Sava fluas en Danubon ĉe fortikaĵo Kalemegdan. Loka grupo okcidentstile pulsmuzikis en la placo.

Postan tagon, ek al nekonata Bulgario, lando de la ĉi-jara Kongreso. Sude de Beogrado, nova aŭtovojo (ankaŭ pagiga), kiun ankoraŭ konstruadis junular-taĉmentoj en uniformo, sendube la Tito-anoj pri kiuj ni jam aŭdis.

Ni gratulis nin pro nia facila vojaĝado. Ĉu ni neniam lernos? Policano ĉe motorciklo ekaperis kvazaŭ magie. La tuta trafiko devas devojiĝi en malvastan ŝtonozan vojaĉon, kiu serpentumis tra izolaj vilaĝetoj en la valo.

Imagu al vi miksaĵon de aŭtistoj el tuta

Eŭropo! Imagu la belajn, eĉ luksajn, aŭtojn! Imagu la bezonon atingi diversajn celojn! Sed ne imagu, ke ĉio estis dolĉeco kaj akordo!

La vojaĉo iĝis ĉiam pli kaj pli sulkoplena. La kavoj iĝis kavegoj. La polvo tiel nebuli densiĝis, ke ni povis vidi nur du aŭtolongojn antaŭ ni. Ni filmis ĝin. Dume, brulegis la suno. Toĉ kaj mi estas britoj. Ni rezonis, ke se ni iras en unu direkton, aliaj venos en kontraŭa direkto. Italoj, germanoj kaj jugoslavoj rezonis alie. Ilia metodo estis preterpasegi ĉiun antaŭ si, plenŝtopante la vojon, klaksonante kaj minacante. La vilaĝanoj venis amase el siaj dometoj por rigardi la spektaklon, kaj priridegi.

Ruldomoj danĝere balanciĝis kaj skuiĝis. Aŭtoj, pro subita kuro en kavon, paneis, kaj restis senmovaj insuloj en oceano de furiozo. Du-tri homoj (mi ankaŭ) penis persvadi al la miks-rasa aŭtisto-svarmo resti en vico. Ho ve kaj ho vane! Kaj—jes, vi divenis—subite alia aŭto-svarmo tiel densa kaj freneza kiel la nia, rampis de la kontraŭa direkto. Ĉio haltiĝis, dum pli ol duonhoron. Blasfemioj kaj sakroj. Pluraj jugoslavoj devojigis sin trans krutaj randoj en la kampojn, forkurigante la azenojn, kiuj estas la vilaĝa ekvivalento de aŭto.

Viro en aŭto plenpakita de homoj praĝentile petis akvon por la infanoj. Lia propra botelo estis jam malplena. Ni donis. Tuj mi komprenis la psalmajn aludojn al akvo en sunbakita lando. (Nia akvobotelo savos nin plurfoje dum la ferio.)

Por eĉ pli turmenti nin, ni povis vidi supre sur la monteto la trafikon denove iranta laŭ nia lasita vojo. Ni venis al ponto, sub kiu ne povis iri tri altaj kamionoj. La kondukistoj preskaŭ ploris post sia preskaŭ du-hora suferado. Neniel en tiu dense pakita mallarĝa vojo ili povis eĉ returniĝi.

Fine, ni revenis al la ĉefvojo, kaj rapidis tra nekredible spektaklaj montoj al Bulgario.

Demandoj ĉe la landlimo. Ni jam havis validan pasporton kaj vizon, sed ankaŭ

endis identigo-karto (ia speco de legitimilo); tial la demandoj. Jam tute mallumiĝis pro nia deviga rondiro tra vilaĝaĉoj. En la monŝanĝejo iu italo eksplodis pro kolero. Germano restantigis mian viclinion, postulante ion al kio li ne rajtis. Dumtempe, Toĉ simile aventuris, akirante turismajn benzin-kuponojn. Kun mono kaj kuponoj, ek al Sofia!

En socialismaj landoj turismaj hoteloj plej ofte lokiĝas en la urbocentro; do, ni kondukis rekte al la urbocentro! Simpla sistemo. Nu...

Antaŭ la plej impona hotelo ni demandis. Jen, laŭ la hotel-flanko, vojo, kaj apud la vojo, nur ses cent metrojn for, estis la neona nomtabulo de nia hotelo. Triumfo! Post kvin minutoj ni eniros kaj manĝos! Post duon-horo ni restis en la strato, malsataj, koleregaj kaj senesperaj. Unudirekta sistemo. Ronde kaj ronde ni veturis, ĉiam ekvidante la hotelon inter du konstruaĵoj, aŭ eĉ ĉe la kontraŭa flanko de la sama placo. Mi demandis ree kaj denove per la rusa lingvo (kiu tre similas la bulgaran) kaj ni obeis laŭvorte la donitajn instrukciojn. Fine, ni forlasis la aŭton apud la nacia teatro, kaj piede iris al la hotelo, ĉiu kun unu valizo. Tie oni klarigis anglalingve kie parki. Toĉ foriris kaj baldaŭ revenis. Li iris, kiel instrukcita, laŭ malpermesita vojo, kaj parkis en malpermesita loko. Verŝajne, se oni estas gasto de tiu turisma hotelo, ne validas la anoncoj. Ni manĝis kaj dormis.

En la mateno mi vidis grandan tabulon apud la aŭto. Per rusa vortaro mi vorton post vorto tradukis. La loko estis rezervita ekskluzive por la stabo de la hungara ambasadejo. En lando, kie preskaŭ ĉiuj privataj aŭtoj apartenas al rusaj teknologi-konsilistoj, oni simple ne pripensis nin.

“Hodiaŭ ni vojaĝos *rapide* al Varna!”
Ha, homoj de naŭva fido!

(*Daurigota: La Malfacila Arto Manĝi*)
Don Lord

LIMDATO

Limdato por ricevo de materialoj celantaj la proksiman numeron estas la 1-a de marto, 1979.

LAŬOKAZAJ

LINGVAJ

NOTOJ (LXXVII)

Kazo post krom

S-ro Pendlebury riproĉas min, ke mi misprezentis liajn ideojn en *LLN* (*LXXV*), unue implicante, ke li neniam uzas nominativon kun *krom*, kaj due citante, kvazaŭ ĝi estus lia, la frazon *la pioniroj de novaj ideoj renkontas nenion ol moko kaj atakoj*. Relegante la koncernan alineon, mi ja konstatas, ke mi skribis sen sufiĉa atento, kaj ĉi tie mi volonte korektas la erarajn prezentojn, nome: (1) s-ro Pendlebury uzus nominativon kun *krom* en tia frazo kiel *Krom mi (ankaŭ) ŝi vizitis lin*, kaj (2) la frazo *la pioniroj . . .* estis zamenhofa, *krom* en tiu detalo, ke mi anstataŭgis la zamenhofan *krom* per *ol*, laŭ la prefero de s-ro Pendlebury. Mi tamen ne konsentas kun li, ke la zamenhofa frazo estas nepardonoble erara kaj nekomprenebla.

Mi ne havas la spacon pritrakti ĉi tie la pli grandan ceteran parton de la letero de s-ro Pendlebury, kiu ŝajne celas la plejblan logikon en la uzado de Esperanto, eĉ se Zamenhof ne ĉiam sekvis la saman principon, kaj kiu krome volas forigi la supersignojn el la lingvo.

Aŭditorio

En la revuo *Esperanto* (septembro) mi trovis, ke oni uzis tiun vorton en la senco de *aŭdantaro*, kiun sencon ĝi ne havas ĝis nun en Esperanto. En la rusa kaj iuj aliaj slavaj lingvoj, la similforma vorto jes havas du sencojn—*preleĝejo* kaj *aŭdantaro*. Ŝajnas, ke ĉi tie ni havas ankoraŭ novan ekzemplon de malfacilo, pri kiu mi komentis antaŭ dek jaroj (*LNN(XXIII)*)—la tiel nomataj fremdaj aŭ internaciaj vortoj, kvankam forme similaj en pluraj gravaj lingvoj, ne ĉiam samsignifas. (Mi tiam donis kiel ekzemplojn: *kontroli*, *simpatia*, kaj *hospitalo*.)

La ĝusta lokado de adverboj

En *Sennaciulo* (aŭgusto-septembro) sur p.67 staras la frazo: . . . *tiuj teĥnokratoj ofte nur vidas unu aspekton . . .* La vorto *nur* devus stari post *vidas*. Sur p.72 troviĝas la jeno: *La ukraina diktaturo . . . ne nur batalis kontraŭ la ruĝaj trupoj . . .* Ci tie la sencon pli bone esprimus: . . . *batalis ne nur kontraŭ la ruĝaj trupoj . . .*

Nura

Sur la ĵus menciita paĝo oni trovas *nura* anstataŭ *sola* aŭ *ununura*. Angla lingve *nura* tradukiĝas per *mere*.

Starti

En *Sennaciulo* (oktobro) mi legis sur p.81: *Ni startis . . . por vizito . . .* kaj sur p.82: *Ekde la 13-a horo startis 5 aŭtobusoj por diversaj ekskursceloj*. Mi preferu uzus *ekiris* en ambaŭ frazoj, ĉar laŭ *PIV* *starti* signifas (1) *Komenci sportan agadon en konkuro* kaj (2) *Ekfunkcii* (pri motoro k.s.). Kial preferi neologismon teknikan, kiam ni havas je nia dispono tute bonan zamenhofan vorton, kiu esprimas la bezonatan sencon?

Siajn aŭ liajn

Sur p.84 de la sama organo troviĝas frazo: *Amiko de niaj gvidantoj invitis nin viziti siajn vinkelojn*. Tie la vorto *siajn* laŭregule signifus *niajn proprajn*, ĉar ĝi rilatas al la subjekto *nin* de la verbo *viziti*. Sed la senco estas evidente: *la vinkelojn de la amiko*, kaj tial oni devus skribi *liajn*.

La transitiveco de verboj en Esperanto

En *Dia Regno* (aŭgusto-septembro) aperis interesa artikolo de Bernard Golden, kiu citis erarajn uzojn fare de pluraj akademianoj, kiel ankaŭ de iuj konataj kaj prestiĝaj periodaĵoj. Golden atentigis inter alie pri tio, ke en la ĉefaj okcident-eŭropaj lingvoj oni ne distingas inter la transitiva *komenci* kaj la netransitiva *komenciĝi*, kvankam la rusa kaj la hungara faras tian distingon. La samo validas pri multaj aliaj similaj paroj.

Frankofonulo

En la ĵus menciita artikolo Golden uzis tiun neologismon, kaj poste—supozeble kun la sama senco—la vorton *francin-gvulo*. Ne estas klare al mi, ĉu tiuj vortoj havas malsaman sencion ol la zamenhafa *franclingvano*. Se ilia senco estas alia, kia ĝi estas?

Avo

LAŬ MIA OPINIO . . .

. . . Mi ĉiam ĝuas la Chaucer-tradukojn. Sed, ĉar laŭdo sen kritiko ne valoras, mi (kiel senhumura friso) trovas BE iom tro Brita, eĉ Angla! Ŝajne la sola nepardonebla peko estas manko de humuro! Ĉu inteligentaj homoj ĉiam devas ridaĉi kaj heni? Tiu Alariko estas tedulo. Ankaŭ Don Lord; nenio en lia rakonto eĉ ridetiĝas min! Homo kiu vojaĝas tra Eŭropo sen scii ion pri geografio en nederlandaj okuloj estas seninteresa stultulo, eĉ se li mem "krevis pro ridegado". Se mi trovas mankon en la esperantistaro, ĝi estas ne manko de ridado (mi kutime sufiĉe bone amuziĝas) sed manko de seriozo: oni ekscitiĝas pri Ido, -ito kaj Ivo, sed ne pri iu ideo. Jen mirinda ideo—universaleco, sed kie estas niaj filozofoj? Eble vi pensas pri Lanti, sed nek lia filozofio (se ĝi meritas tiun nomon), nek lia persono varmigas mian koron! La art. de Edwin de Kock estas bona, ankaŭ la recenzoj.

D-ro Albert Goodheir

UEA-DELEGITOJ

Estas grave por la Movado, ke la delegita reto de U.E.A. restu vast-ampleksa kaj daŭre kresku. En Britujo ne estas tiel—domaĝe! Ni perdis delegitojn en kelkaj urboj lastatempe—Abergele, Aberystwyth (Ystrad Meurig), Maldon, Newport kaj Sheffield.*

Por fariĝi Delegito de U.E.A., necesas esti preta servi, esti kompetenta Esperantisto kaj Membro-Abonanto de U.E.A. (kun Jarlibro kaj revuo 'Esperanto') dum almenaŭ unu jaro. Ĉu vi povus fariĝi Del. de U.E.A.? Se jes, bonvolu skribi al la Oficejo de B.E.A./E.A.B. por formularo (respondilo). Se ne, ĉu vi ne povos

pripensi la ideon por postaj jaroj kaj fariĝi MA de UEA ek de 1979?

J. B. Hon. Sekr.

**Delegito signifas Delegito, Fak-delegito, Vic-delegito kaj Junular-delegito.*

POR HELPI ESPERANTON EN ZAIRE?

Nsimba Mfumu Ndongala, B.P. 1323. Kinshasa 1, Zaire, Afriko, izola Esperantisto bezonas leg-kaj-lernmaterialon ankaŭ porjunularan kursmaterialon. Kiu helpos?

J.B.

SONREVUO

Kroata Unuiĝo de nevidantaj esperantistoj, Zagreb, Jugoslavio lanĉis en eldonkvanto de 200 ekzempleroj la unuan 90-minutan (duflankan) sonrevuon kun varia enhavo.

Ĝi estas tre taŭga por grupvesperoj. Kiel vi mem konvinkiĝos post aŭskultado de la tuto, la enhavo estas tiel elektita, ke ĝi ne malnoviĝas kun tempopaso.

La prezo (sen ekspedkostoj) estas 5 us.dol. aŭ egalvaloro. Kasedoj por ĉiuj landoj krom Jugoslavio estas mendeblaj ĉe la Libroservo de UEA.

NOVAJ LIBROJ

El la "Verda Biblio" de I. Lejzerowicz. Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝt, 1978. 80 paĝoj.

1. En la komenco la Senkorpa Mistero rigardis al la Verda Popolo. 2. Kaj vidis ke ĝi estas en mallumo. 3. Kaj la Senkorpa Mistero diris: Estu skribita historio de la Verda Popolo. Per tiu lumo ili ricevos torĉon. 4. Kaj la Spirito movis la animon de Profeto loĝanta en la lando de la Spirito. 5. Kaj la Profeto verkis libron pri la historic de la Verda Popolo. 6. Kaj la Spirito vidis la verkon, ke ĝi estis bona.

7. Kaj la Profeto rakontis la historion de la Popolo per klara kaj fidela lingvo. 8. Kaj la Verdaj Fideluloj povis legi la historion de la komenco ĝis la jaro '35. 9. Kaj ili legis la libron kaj konatiĝis kun pluraj Profetoj. 10. Kaj laŭ la ordono

de la Senkorpa Mistero la historio montras la belan simplecon de la Verda Lingvo.

11. Kaj ni legas ke en la dekdua monato de la jaro, en la dekkvina tago de tiu monato la Verda Popolo festas la Feston de la Libro. 12. En tiu Festo estis foje Profeto de centra lando kaj li kantis elegion. 13. Kaj aŭskultinte la elegion la Popolo trovis strangajn vortojn kiuj nomiĝis Neologismoj. 14. Kaj parto de la Popolo bonvenigis la Neologismojn. 15. Aperis aliaj Profetoj kaj ili malkovris plurajn Neologismojn. 16. Kaj alia parto de la Popolo estis affiktita kaj ne komprenis la kanton de la Profeto. 17. Ili diris: Ni lernis la Fundamenton kaj la Radikaron kreitajn de la Senkorpa Mistero kaj ne povas kompreni la elegion.

18. Kaj la historio rakontas multajn aliajn travivaĵojn de la Verda Popolo. 19. En la libro ni legas la Kontrakton de Helsinki. 20. En la libro ni ne legas la Principaron de Frostavallen, kaj estas ĉar la Principaro ne kreiĝis ĝis jaroj post '35. 21. Nun Kontrakto kaj Principaro estas forgesitaj de la Verda Popolo ĉar ne estis kreitaj de la Senkorpa Mistero.

22. En la Popolo estas homoj kiuj uzas Neologismojn sed la Popolo estas tolerema kaj ne forpelas ilin. 23. Kaj la Verdaj Fideluloj ankoraŭ uzas la vortojn de la Fundamento kaj la Radikaro, kaj la libro estas por ili ĉar estas skribita laŭ la konsiloj de la Senkorpa Mistero. 24. Kaj la Spirito diras al la Popolo: En ĉiu Festo de Libro, en ĉiu Klubo estu ĉi tiu libro por ke la homoj aĉetu ĝin kaj legu ĝin, ĉar la lingvo estas bela, facila kaj humura. Por eterne de nia bono. Amen.

Alariko.

Kain kaj Abel, de Sándor Szathmári. Hungara E-Asocio, Budapest, 1977. 287 p.

Sándor Szathmári estis homo kaj konsterna kaj konsternita; des pli strange, ke li perverse rifuzis distingi inter la du. Mi povus kredi tion preseraro, ĉar ili sintrudas ĝis nekomprenebleco, se li ne

farus same pri naŭze/naŭzite, embarase/embarasite, surprize/surprizite, k.s. Mia opinio, verkisto ne povas havi pli noblam celon ol konsterni kaj subfosii, kaj ĝustetion celas Szathmári, jen sukcese, jen ne. Kelkaj noveloj suferas de troa longeco ekzemple, "Superstiĉo", "La Guarbo"); en ili la stilo estas peza kaj mallerta, kaj mankas neta strukturo; aliaj (precipe tiuj pri estonta tempo, kiel "Honorigo") suferas pro mallongeco, ĉar tro da ekspliko enŝoviĝas en maltra da spaco. Tamen per "Muŝoj" Szathmári pravas, ke li povas akre kaj nete trafi per mallonga rakonto, ĉar kvankam ĝi estas nur tiom longa, kiom "Honorigo", ĝi estas juvelo, kiu ilustras la principon de "sufiĉo kaj neceso".

La temoj de la noveloj multe varias, kaj Szathmári variigas la stilon konforme al la etoso de la novelo; pleje plaĉis al mi la ĉiutagaj temoj kun ĉiutaga stilo, kaj mi taksis malsukcesa la enkondukon de neesperantaj vortoj, precipe se ili tute ne taŭgas, kiel en "La barbaro", kiam usonano nomas kamaradon "old fellow".

Resume, mi ĝuis la kolektitajn novelojn kaj ĝojas, ke oni kolektis ilin (eĉ kun mispresoj), kvankam mi bedaŭras, ke post "Kazohinio" Szathmári ne plu verkis grandan romanon.

Se vi ŝatas la satiran arton, aĉetu la libron, kaj frandu la mokadon jen amuzan, jen amaran.

Dafne Lister

El la vivo, de Vesna Skaljer-Race. Beograd, 1977. 67p.

Kolekto de 15 skizoj aŭ rakontetoj prenitaj el la ĉiutaga vivo. La poeta talento de la aŭtorino—plurfoje premiita en la Belartaj Konkursoj—donas al la skizoj varmecon kaj aŭtentikon. Aparte korduŝaj estas tri el la militaj jaroj. La libreto estas tre taŭgas kiel legaĵo por daŭrigaj kursoj.

W. Auld

ANONCETOJ

3p por ĉiu vorto. Minimume 45p. Antaŭ-pagenda.

Aleksandro Mollison, 6 Rosemarkie Crescent, Broughty Ferry, Dundee agas kiel peranto por Sciencaj Komunikaĵoj, ampleksa kaj varia eldonado, kiu estas aldono de Budapŝta Informilo. 100 p. £1. pĉk 19 995 0008. La peranto aranĝos por daŭra sendado.

Kio estas SAT? Sennacieca Asocio Tutmonda bonvenigas informpetojn. Informiĝu ĉe: SAT en Britio, 29 Farrance Road, Chadwell Heath, Essex, RM6 6EB.

Are you using your insurance to help Esperanto at no cost to yourself? If not, please write to G. D. Carter, 51 Wyche Road, Malvern, Worcs.

You could set up a Special Memorial Fund within the Norwich Jubilee Esperanto Foundation which would provide the gift of a Book or a Travelship and thus provide a permanent Memorial to yourself, your dear one, or your great friend. Particulars from

Norman Williams, M.A., B.Sc., 237 Two Trees Lane, Denton, Manchester, M34 1QL.

SCOUTS! Join the Scout Esperanto League. Enquire 21 Brookfield Avenue, Waterloo, Liverpool, L22 3YE.

MOTORISTS! Join the International Motorists Club (IEKA). Life Membership £1.65. British Representative: J. Brownlee, 20 Sunnyside Gardens, Upminster, Essex, RM14 3DS.

Maria Dangow, 12 jaraĝa knabino kiu finis elementan kurson de Esperanto volas korespondentojn. Adreso ul.Styczynskiego 37m.6. 44-100 Gliwice, Poland.

Por prilaborata bibliografio de sciencaj artikoloj en Esperanto ĉiuspecajn revuojn, periodaĵojn kaj kolektivajn verkojn kun sciencaj artikoloj en Esperanto serĉas, Edward Wojtakowski, P O Kesto 312, PL.50-950 WROCLAW 2, Pollando.

Volas korespondi

Esperanta geedza paro (itala kaj ĉefino) Mario kaj Valerie Marseglia, Via Massari 98, 10 100 TORINO, Italy.

Gal Vardi, Bejt Kama, D;D; Vegev, Israel, pri elektronio, poŝtmarkoj.

Anti-Ro Attitudes

NATIONAL ATHEISTS who believe that the human race is rightly "culled" by war, and who therefore accept the possibility of atomic destruction, logically oppose Ro.

OTHER ANTI-RO ATTITUDES often result from lack of integrated thought. This can be remedied by reflection.

ON WHAT IS YOUR ATTITUDE BASED? Do you oppose Ro World Government because you consider the absorption of the many into one an impossibility? But it has actually occurred over and over again throughout history e.g. in England in the 10th century, in N. America (formation of U.S.A.) in the 18th century. Do those who admit such developments regret them and wish to go back to former disunity? Is it that they believe unity right when achieved but wrong when attempted? Perhaps they swallow the silly Communist claim that a World State must be Communist. If a Communist World State develops, whose fault will it be now that Ro is here as the sensible alternative to Anachronistic Atheist Nationalism?

Ro is short for
Regneco. Write for
The Mitchell Report.



The Ro Organizer,
BM/World State House,
London W.C. 1.

Ĉina monata gazeto en Esperanto

EL POPOLA ĈINIO

varbas abonantojn de 1979



1. Periodo de abonvarba kampanjo:
 Ekde la 1-a de oktobro 1978 ĝis la 31-a de januaro 1979.
 Ĉiu, kiu faras abonon aŭ reabonon en la varb-kampanja periodo povos senpage ricevi unu ekz. de grandformata kolora kalendaro en Esperanto.
2. Abonprezoj:
 - Por 1 jaro : £1.70
 - Por 2 jaroj: £2.50
 - Por 3 jaroj: £3.40
3. Abonvarbado estas bonvenigata. La abonvarbanto sendu la kolektotajn abonilojn kaj pagojn al la loka peranto, petante ke la lasta notu lin kiel varbanton. Oni ankaŭ povas sendi ilin rekte al la Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN. Post plenumo de la aboniloj la abonvarbanto povos ricevi memoraĵojn kun ĉina stilo.
4. Abonu ĉe la loka peranto:
 - Brita Esperantista Asocio
 - 140 Holland Park Ave.
 - London W11 4UF
 - aŭ rekte ĉe la ĝenerala distribuanto:
 - Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN**
 - P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio**

SPECIMENO AKIREBLA SENPAGE